

Aŭstraliaj Esperantistoj

Novajletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ

Lingvoilo Google Translate Plena Ilustrita Vortaro

PLENUMITA 01/06/2017 Tricentdudekkvara eldono (unua eldono 20/09/2011)

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpq.com.au;



Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale

SENDATA AL 325. La informa kaj noma paĝoj reaperos nur en la dekaj eldonoj



Oni povos metu siajn nomon, retadreson, kaj nomon de siaj lando kaj urbo al la ricevanta listo

rspring@tpq.com.au



Ekstudis pli ol **875,000** lernantoj en la Esperanto-kurso de Duolingo.

<https://www.duolingo.com/course/eo/en/Learn-Esperanto-Online> (Ekde la 28a de Majo 2015)

La Esperanta Retradio donas bonan ĉirkaŭ-5-minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon.

<http://esperantaretradio.blogspot.co.at/?view=magazine>



La Manlia Esperanto-Klubo

Anoj kunvenas la unuan kaj trian Sabatojn je la 10atm.

Bavarian Beer Café, Manly Wharf. Unu taso da klubpagata kafo

La 3a de Junio estis la unua Sabato. Venu!



Mi ĉeestas tiun bonan Esperantan klubon kaj raportas al AE pri la klubo. **Roger Springer**



“Malgrava historieto pri mia vivo” (Bob Felby)

Nun AE kopias la tutan libreton iom post iom ĝis la fino.

Bona rakonto kaj bona Esperanto

Ĉapitro 1 Mia infanaĝo (7a parto)

La printempo estis bela en “Gl. Enghave”. Tiam venis multaj homoj, eĉ iu kun lignokruro. Venis ankaŭ tranĉil- kaj tondilakrigisto, ĉar ĉe ni li povis perlabori iom da mono ! Ili trinkis multe da biero. Iuj ludis akordionon kaj aliaj violonon. Ĉiuj sciis kanti. Mi admiris ilin mirante, ke iuj homoj estas tiom talentaj.

Ni estis multaj knaboj en Gl. Enghave, kaj ni fondis piedpilkudantan grupon. Ni ludis sur unu el la bienistaj kampoj.

Iun tagon ni legis en la gazeto, ke buso venos tra la strato meze de nia ĝardenaro. Ni infanoj, t.e. Gerda, Børge kaj mi, staris ĉe la nova bushaltejo kaj gape rigardis la tute novan buson flavan. Ni estis fotografitaj, la aŭtobuso haltis, kaj iom poste forveturis, ĉar ni ne eniris ĝin, kaj la postan



tagon nia bildo aperis en la taggazeto. Jes, vere, oni komencis konsideri ankaŭ nin civilizitaj homoj !

Estis en Gl. Enghave ankaŭ vendejo. Iu riĉulo venis el Kopenhago kaj disvendis necesajojn. Eblis aĉeti ĉion necesan por la vivo. La sola malavantaĝo estis, ke ĉiun vendredon oni devis pagi por la tuta pasinta semajno. Do vendredojn neniu iris butikumi !

Mia paĉjo ofte sendis min tien por aĉeti al li razilklingon. Tia razilklingo kostis tiam 10 øre, t.e. 10 oerojn, 2.5 cendojn. Iam mi revenis de la vendejo sen la klingo. "Kie en la mondo estas la klingo ?" demandis paĉjo. "Kiu klingo ?" respondis mi. Kune paĉjo kaj mi reiris al la vendejo, Paĉjo demandis, ĉu mi vere estis tie aĉetante klingon. La vendejisto diris, ke jes. Tiam paĉjo kaj mi iris hejmen la saman vojon, kiun mi sola iris iom da tempo antaŭe. Feliĉe ni trovis la razilklingon, kaj paĉjo povis razi sin.

Li uzis tiun klingon kiom eble plej multajn fojojn. Kiam ĝi estis tro malakra, li akiris ĝin, ne! ne sur sia propra pordosoĵlo, sed sur tiu de la najbaro.

Tiu nia najbaro estis tre purema. Li ĉiam aperis freŝe razita. Tio amuzis nin normalulojn, kiuj al kutimiĝis al paĉjo. Diris nia najbaro, ke ĉar li laboras en la kotonŝpinejo en Valby, kie la kotonpolvo tiklas kaj jukigas lin, li tre ŝatis post la laboro esti tute pura. Same kiel ni ĉiuj hodiaŭ, ĉu ne ?

Daŭrigota

Bob Felby



Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro

Saluton Kara Roĝer,

Ĉu mi povas fariĝi abonanto de via novaĵletero?

Interalie mi eldonas monatan revueton "Turka Stelo" kiu ankaŭ estas senpaga, kaj mi povas abonigi la interesantojn per nomo + retpoŝtadreso. Sed al tiuj kiuj ne volas aboni, la revuetoj ankaŭ troviĝas en nia retejo ĉe:

<https://esperantoturkiye.wordpress.com/category/dergi-revuet/>

Mia fina demando: "Ĉu mi povas republikigi artikolojn el via bulteno en mia revueto?"

Amike, Vasil Kadifeli



Kiu estas la plej facila lingvo por eskimoj?

La membroj de la Melburna Esperanto-Asocio kune solvis la ĉisubajn tradukojn de malfacilaj anglaj esprimoj. Ni simpatiu kun la kompatindaj eskimoj, kaj kun la bonŝanca mi. Ĉiuj tiuj esprimoj aperis en la ĵurnalo "The Age". Se vi trovas pli bonan tradukon, igu ĝin komunikati. Ne provu laŭvorte traduki la frazojn!



- 1). When in the film the two men frock up -- Dum en la filmo la du viroj tute ekvestas sin virinecaj.
- 2). A bruising rise to the top for them -- Obstakla leviĝo ĝis la pinto por ili.
- 3). That quirky new comedy oozes charm -- Tiu kaprica nova komedio elfluigas ĉarmon.
- 4). The program "Living Black" is cool stuff -- La programo "Nigruli" estas interesaĵo.
- 5). We should keep a close eye at the weather -- Ni atente observadu la veteron.
- 6). We are always taking the weather with us -- Ni ĉiam sekvatas de la sama vetero.
- 7). Beef it up, mates! -- Uzu pli da forto (Plifortigu ĝin), kamaradoj!
- 8). She's now acting in a meatier role -- Ŝi nun aktoras en pli signifa rolo.
- 9). One needs to have all one's ducks in a row -- Oni devas ordigi ĉiujn siajn taskojn laŭ graveco.
- 10). "Emirates" is nipping at the heels of "Singapore Airlines" for second spot among the long-haul carriers -- "Emirregnoj" preskaŭ atingas la nivelon de "Singapura Flugkompanio" por la dua rango inter la longdistancaj transportistoj.
- 11). For women, sexual desire is malleable -- Por virinoj la seksumdeziro estas direkte ŝanĝebla.
- 12). Your latest lover is certainly dragging his feet -- Cia nuna amanto certe prokrastas.
- 13). He has a music festival under his belt -- Li jam partoprenis en muzikfesto.
- 14). The tax fraud case extradition case will be decided -- Oni decidis pri la afero de la alilandigo en la kazo de la impoŝtfraŭdo.
- 15). The country is to keep ships coming in -- a) La lando daŭros ebligi ke ŝipoj envenu.
b) La lando daŭros reteni ŝipojn envenantajn.
- 16). They were stretchered to the heli -- Ili brankard(um)atis al la helikoptero.
- 17). Victimhood is not mandatory -- Viktimeco ne estas deviga.
- 18). Time flies like an arrow, but fruit flies like a banana - La tempo flugas kiel sago, sed frukto-muŝo ŝatas bananon.
- 19). Atheism is a non-prophet organization -- Ateismo estas neprofeta organizo.
- 20). Can an atheist insure against Acts of God? -- Ĉu ateisto povas ricevi asekuron kontraŭ Agoj de Dio?
- 21). If enough people favourite something, it becomes more visible and more popular -- Se sufiĉe da homoj aldonas ion al sia favor(aĵ)aro, ĝi plividebliĝas kaj plipopulariĝas.
- 22). The de-facto benchmark contract deals -- La negocoj de kontraktoj laŭ efektiva mezurbazo.
- 23). Out of pocket expenses -- Memkrompagaĵoj.
- 24). I'm going for a dip -- a) Mi iras naĝi; b) Mi iras batali.
- 25). A moving scenery in a moving scenery -- Emociiga pejzaĝo en moviĝanta scenejo.
- 26). Don't get off your bike = Don't get your bra in a tangle = Don't get your knickers in a knot -- Ne ekscitiĝu!

Marcel Leereveld.



AEA informas.



Aŭstralia Esperanto-Asocio C/- G.P.O. Box 2122, Melbourne 3001

Pri Amikumu

Saluton,

Koran dankon pro via daŭra membreco de la Aŭstralia Esperanto-Asocio.

Unu el la multaj roloj de AEA estas helpi aŭstraliajn esperantistojn kiuj laboradas por la movado.

Pli frue en la jaro AEA sponsoris gravan projekton por krei poŝtelefonan aplikaĵon (apon), kiu celas ligi proksimajn esperantistojn, kaj instigi ilin kunveni kaj babili. Eble vi jam aŭdis pri ĉi tiu projekto – Amikumu – gvidata de sidneĵano Richard Delamore kaj berlinano Chuck Smith.

Nu, ni vere ĝojas anonci ke la apo estis lanĉita pasintan monaton, kaj jam havas pli ol 3 000 uzantojn, kiuj sendis pli ol 50 000 mesaĝojn! Do, se vi ankoraŭ ne elŝutis la (senkostan) apon, ni forte rekomendas ke vi faru tion: aliĝu al la nova komunumo kaj subtenu ĉi tiun bonegan projekton.

Ni alkroĉis flugfolion pri Amikumu, sed vi ankaŭ povas lerni pli, kaj elŝuti la apon ĉe <https://amikumu.com/eo/>.

Se vi konas aliajn esperantistojn, kiuj eble ankoraŭ ne estas uzantoj de Amikumu, plusendu al ili ĉi tiun mesaĝon. Kaj diru saluton se vi vidas unu el ni en Amikumu!

Plej bondezire,

Estraranoj de AEA: Sandor Horvath, Jonathan Cooper, Esther Parris, Heather Heldzingen, Indrani Beharry-Lall, Joanne Johns



La Verda Stelo

La Verda Stelo (esperanto: Verda Stelo) estis unue proponita en iu 1892 artikolo en 'La Esperantisto' por uzo kiel simbolo de reciproka rekono inter esperantistoj.

Dum jaroj, ĉiu sciis, ke esperantisto identigas sin, kun la malgranda verda stelo kiun li portas. Nun la plej multaj Esperanto-parolantoj ne plu portas tiujn pinglojn. Kial ne?



Roger Springer




Ne plu da nomoj!

Kara Vera, mi ne malkaŝos vian ameman nomon por mi, kaj certe *ne* la devenon. Tio restu inter vi kaj mi.

Kaj ankau - mi volas eviti poste ian eblan kromnomon de iu ajn! Pli ol sufiĉis tiaĵoj!!

Indrani Beharrylall



Kelkaj travivaĵoj miaj.



La nunan semajnon, la lastan de Majo, mi vizitis la nordan kaj la sudan partojn de la insulo-provinco Tasmanio, parto de suda Aŭstralio, kiu suda Aŭstralio enhavas sudan Vestralion, Saŭstralion, Viktorion, kaj Tasmanion. Mi tie ne renkontis Esperantistojn, ĉar mi ne havis ilia(j)n nomo(j)n kaj adreso(j)n. Kaj eĉ se mi havus, mi ne konus ilin estantajn novaj Esperantistoj. Mi renkontis plurajn malnovajn geamikojn, unu da ili la unua edzino de George Lancaster, kiu lasta instruis, kun mi, Esperanton kiel oficialan fakon en la Friends-Lernejo en Hobarto en la 1950-aj jaroj. Ĉar mi forlasis Tasmanion en 1960 por loĝi kaj instrui en Melburno, kaj post mi forlasis Tasmanion en 1962 por oftalmoskopiumi (okulspecialisto) en Britujo Georgo, Esperanto ne plu oficiale instruitis en la Friends' School. Esperanton mi oficiale ekinstruis post kelkaj jaroj en la melburna Caulfield Grammar School.

Vojaĝinte multfoje tra tuta Aŭstralio, mi plu opinias, ke Tasmanio estas la plej bela kaj interesa provinco de Aŭstralio. Do mi estas "tasmaniako" (tasmanio-maniulo). Ankaŭ tie la vetero estis same milda kiel en Viktorio dum la antaŭa kaj dum ĉi tiu aŭtuno.

Unufoje, en 1957, Alida kaj mi kondukis grupon de Esperanto-lernantaj geknaboj de la Friends-Lernejo al la supro de Monto Wellington, nun parto de Granda Hobarto. La vetero estis bela kaj suna kaj varma, sed ni tamen surhavis varmajn vestojn, ĉar la temperaturo ĉiam estas iomete aŭ iomege pli malvarma sur la montopinto. Ni aŭtobusis ĝis duonvoje sur la monton, kaj piediris la reston, aŭ almenaŭ tion ni intencis. Ĉi tiun tagon estis iomege pli malvarme sur la monto kaj post tri kvaronhoroj da promenado ni eniris veteron kun forta neĝoŝtormo kaj malfacilege plu grimpis la vojon al la supro. Sed malpost ol alveni tie, kie oni ja povas ŝirmi sin en publika kabano, kelkaj el la infanoj ne plu kapablis tiri sin pli alten, kaj ni haltis en la surtera kaj la falanta neĝoj. Unu el la infanoj ekhavis frostovundon (frostbite) en kelkaj fingropintoj, kaj poste bezonis medicinan helpon. Tiu knabino en sia posta junula periodo fariĝis medicina kuracisto. Kiam poste ŝi laboris en la malsanulejo en viktoria Geelong, ŝi iomete Esperant-umis kun la malgranda Geelong Esperanto-grupo. Tiu grupo iam invitis la melburnanojn por ceremonie planti en la loka botanika parko Esperanto-arbon, kun permeso de la loka distrikto.

Nu, sur la pinto de Mount Wellington staras konstruaĵoj uzataj por elsendi televidoprogramojn. Ĉiam tie estas kelkaj deĵoristoj. Iliaj veturiloj havas neĝpneŭmatikaĵojn, kaj por forfandi la neĝon ĉirkaŭ la konstruaĵo kaj sur la vojo ili havas Diesel-maŝinon kiu elŝprucigas grandajn flamojn. Hazarde iu el iliaj veturiloj preterpasis el la supro nian grupon kaj konstatis, ke ni bezonis helpon. Ili transportis la infanojn kaj nin al la televida staciejo kaj ŝprucis la flamojn al nia grupo sen bruligi nin, kaj ni sekve elfrostiĝis. Post tio ili transportis nin al la suna kaj varma kaj senneĝa piedo de la monto, kaj ni piede daŭrigis nian ekskurson retroen al la urbo.

La sekvantan tagon la veturilo de la televidostacio mem kaptiĝis pro la dika neĝo kaj devis forlasati duonvoje, kaj la deĵoristoj devis resti sur la monto.

La dudek infanoj de la Esperanto-grupo lernadis la lingvon lunĉhore, ĉar tiam Esperanto ankoraŭ ne estis parto de la lerneja horaro. Ili formis sian Esperanto-klubon kiel parton de la lernejo. Dudek jarojn poste mi staris sur la rando de ĵava vulkano kiam salutis min unu el miaj antaŭaj lernantoj. Ankaŭ tiu monto, vulkanmonto, estis tre alta, tiom ke tropikaj plantoj ne

povus kultivati tie, kaj kie oni do kreskigis nederlandajn legomojn, kiel brasikojn, kiuj en multaj partoj de Indonezio ne kreskigeblas, pro la daŭra varmo.

Noto: Mi verkis la ĉisuprajn spertojn ankaŭ por montri Esperanto-stilon.

Marcel Leereveld.



Semajna raporto de Melburno



LUDVESPERO

Bedaŭrinde la ludvespero por ĉi tiu monato estis nuligita ĉar Petro kaj mi devis vojaĝi al Brisbano.

DIMANĈA KUNVENO

Dimanĉon la 28an de Majo kvar homoj kunvenis ĉe Cafe Beer Deluxe. Ili babilis kaj ludis la novan Esperanto-ludon de Peter Williamson.

Nia signo ĉifoje montris "Melbourne Esperado Association" - do oni pli kaj pli proksimiĝas al la ĝusta nomo.

ADIAŬO POR LA BISHOPS

Lundon la 29an de Majo 17 homoj kunvenis ĉe Ross House por adiaŭi Jennifer kaj Alan Bishop antaŭ ol ili reiros al Anglujo por esti kun siaj familianoj. Ni ĝuis bonajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn kaj multaj homoj kortuŝante parolis pri la du gravaj Esperantistoj.



VENONTAJ KUNVENOJ

Dimanĉon 4an de Junio je 15:00 [Kunveno por komencantoj](#) ĉe Cafe Beer Deluxe, Federation Square

Lundon 5an de Junio je 18:30 [Lunda kunveno](#) ĉe Ross House, 247 Flinders Lane

Sabaton 24an de Junio je 19:00 [Ludvespero](#) ĉe Alchemists Refuge, 328 Little Lonsdale Street

NUNAJ SEKVANTOJ (Alklaku la nomon por iĝi plua!)

[Meetup](#) – 804

[Instagram](#) – 73

[Facebook](#) – 292

[Telegram](#) – 20

[Twitter](#) – 253

[Joanne Johns](#)

FLAGOJ DE LA MONDO

Sendis [Esther Parris](#)

Flago	Lando Ĉu vi konas la flagojn?	Flago	Lando?
	Landnomo: <u>Benino</u> Ĉefurbo: <u>Porto Novo</u> Ŝtatestro: <u>Patrice Talon</u>		Landnomo: Ĉefurbo: Ŝtatestro:
	Landnomo: <u>Butano</u> Ĉefurbo: <u>Timbuo</u> Ŝtatestro: <u>Jigme Khesar Namgyel Wangchuck</u>		Landnomo: Ĉefurbo: Ŝtatestro:
	Landnomo: <u>Bolivio</u> Ĉefurbo: <u>La-Pazo</u> Ŝtatestro: <u>Evo Morales</u>		Landnomo: Ĉefurbo: Ŝtatestro:
	Landnomo: <u>Egipito</u> Ĉefurbo: <u>Kairo</u> Ŝtatestro: <u>Abdel Fattah el-Sisi</u>		Landnomo: Ĉefurbo: Ŝtatestro:
	Landnomo: <u>Salvadoro</u> Ĉefurbo: <u>San-Salvadoro</u> Ŝtatestro: <u>Salvador Sánchez Cerén</u>		Landnomo: Ĉefurbo: Ŝtatestro:
	Landnomo: <u>Ekvatora Gvineo</u> Ĉefurbo: <u>Malabo</u> Ŝtatestro: <u>Teodoro Obiang Nguema Mbasogo</u>		Landnomo: Ĉefurbo: Ŝtatestro:
	Landnomo: <u>Zambio</u> Ĉefurbo: <u>Lusako</u> Ŝtatestro: <u>Edgar Lungu</u>		Landnomo: Ĉefurbo: Ŝtatestro:
	Landnomo: <u>Vatikano (aŭ Vatikanurbo)</u> Ĉefurbo: <u>Vatikanurbo</u> Ŝtatestro: <u>Francisko la 1-a</u>		Landnomo: Ĉefurbo: Ŝtatestro:
	Landnomo: <u>Kostariko</u> Ĉefurbo: <u>San-Joseo</u> Ŝtatestro: <u>Luis Guillermo Solís</u>		Landnomo: Ĉefurbo: Ŝtatestro:
	Landnomo: <u>La Reĝlando Belgio (aŭ Belgujo)</u> Ĉefurbo: <u>Bruselo</u> Ŝtatestro: <u>Filipo la 1-a</u>		Landnomo: Ĉefurbo: Ŝtatestro:



3ZZZ

En la elsendo de la 29a de majo, Marcel rakontas kelkajn spertojn el sia vivo. Unu el la temoj de tiu elsendo estas la rifuĝintoj kaj enmigrintoj, do eblas aŭdi interalie intervjuon de Sandor Horvath pri la temo Informas la kunvokanto de la Esperanto -grupo. [Franciska Toubale](#)